

Johann Wolfgang von Goethe,

Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinopingo  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, \*1941-12-23).*

Arg-356-1974 (2014-03-14  
14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en  
<http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Johann Wolfgang von Goethe,

Super montoj regas kviet'

*tradukita de Poul Thorsen*

Super montoj  
regas kviet',  
tra l' foliaro  
nur ventet'  
spiras kun trem'.  
Birdoj arbare silentas,  
se vi atendas,  
pacas vi mem.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (\*1915-01-07 – †2006-01-30).*

Arg-356-708 (2010-05-28  
21:34:24)

*Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.*

Johann Wolfgang von Goethe,

Egalaĵo (Noktokanto de migranto)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Super ĉio iĝas  
Kviet',  
Kaj ne moviĝas  
Pro ventet'  
Iu foli';  
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.  
Atendu – baldaŭe  
Ripozos vi.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-01.*

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20  
14:44:12)